

# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio :  
Box 731F, Elizabeth-str. P.O.,  
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :  
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.  
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 89 (Eighth Year) Melburno (Melbourne), Australio.

10 Novembro 1927

## ANSWERS TO QUESTIONS RE LANGUAGE.

### Concerning the Style of My Recent Works.

You write to say that in my last translations you sometimes find difficult passages. Wishing to convince a non-Esperantist of the wonderful clarity of Esperanto you began to translate for him certain lines of "La Fabistoj" out to your great disappointment you came across a sentence which you yourself did not fully understand, as was also the case with several other Esperantists whom you asked to help you, for they either failed to comprehend the text at all or translated it differently! I can understand your embarrassment, and if it was caused by my faulty translation I ask your pardon; . . . but permit me to suggest that you in part are also responsible. When making an unprepared experiment of such a nature before a non-Esperantist you should have chosen, not a classical and serious work, but some lighter and more simple writing. If this or that sentence in the translated work of a long-departed classicist is not readily comprehensible, it is often the fault, not of the language into which it is translated, but rather of the author himself. You know of course, that the really great writers—those who care more for the con-

tent of their writings than the popularity of the form in which they are cast, often themselves need commentaries, because even their fellow-countrymen fail to grasp the meaning of this or that expression in their works. Do not be surprised, therefore, if in my translations of the classical writers you sometimes find a passage which at the first reading seems murky to you. If it were my intention to give only translations in a popular style of writing I should (1) choose for translation only popular works, (2) all lines not perfectly understood or with difficulty translatable I should either leave out altogether or translate freely, as I thought fit. Such a procedure would be very easy for me, and would claim far less time than does my present system of translation, which often compels me to give long consideration to this or that expression or sentence. But although the apparent value of such translations would by that means be greater, their real value would be much less because (1) in that case our literature would consist only of unimportant works, (2) the translations would not be trustworthy and would be an inaccurate rendering of the original, and (3) our language would not be enriched and would not develop. Especially to this last point would I draw the attention of our writers; it is very desirable that we do not avoid difficulties in translation; rather should we search them out and mas-

ter them, for only in that way will our language become fully developed. We must, of course, avoid national idioms which are not necessary to the text, and must try to translate their sense in the most logical and international manner; but such expressions as are necessarily possessed by every language we must endeavour in some way to translate, and not simply avoid them through fear that they may not please the reader, or that not everyone will fully understand them. One of the chief tasks of our writers must be the development of our language; therefore, if certain expressions which not everyone understands (such as "elrigardi", "subaĉeti" and so on) seem to him to be obscure, he must try to displace them by other and better forms. But if in the endeavour to avoid spoiling their style they avoid the translating of such expressions, they do our language a great disservice. Of course, in this, as in all else, a reasonable measure must be observed. "Not carelessly; not too much at once." New expressions must be introduced little by little, imperceptibly. Besides that, we must remember that our language has to serve not only for documents and contracts, but also for life itself; therefore, (especially in dramatic dialogues of a realistic nature) the crisp and short phrase, even if it is not wholly logical, is often better than a phrase perfectly precise but tiringly heavy and laboured.

### THE VIENNA TRAMS AND ESPERANTO.

Viennese policemen who speak Esperanto wear a badge on their uniform by which they can be recognised in the street. Tram conductors will shortly do the same under an order of the Directorate and the recommendation of the Traffic Commission.

—I.E.S.

### INTERNATIONAL FAIRS AND ESPERANTO.

As in previous years, the Office of the Francfort-on-Main Fair has distributed a very artistic prospectus in Esperanto for the Spring Fair of 1927. The Office will also issue a register of branches in the same language with translations in few other languages,

### RECENZO.

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO (Dua Parto): La Movado 1900-1927; de Edmond Privat. Eldono de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig; 199 paĝoj. Prezo 6ŝ.

Doktoro Privat estas ankoraŭ juna homo, sed li apartenas ankaŭ al la "heroa epoko" de nia movado; en la tempo, kiam "estis gigantoj en la lando," li ja estis unu el la gigantoj. Li rakontis aliloke, ke la redakcio de "Juna Esperantisto" (Hector Hodler kaj li mem) sidis kvin jarojn sur la sama benko de gimnazio kaj kase skribadis kovertojn aŭ legis patrajn leterojn de doktoro Zamenhof kaj profesoro Cart. Kaj en la nova tempo de Esperanto, la pli proza (kaj pli triumfa!) postmilita epoko, doktoro Privat estis ĉiam en a centro de la agado, li kvazaŭ portis sur la sultroj la ŝarĝon de nia afero. Kiu do pli bone povas ĝin rakonti?

Kaj tio ĉi estas loga, eĉ iom sorĉa rakonto. "En la jaro 1900 Ruslando enmanigis la torĉon de l' esperanta lumo al la Francoj"; per tiuj vortoj komenciĝas la libro, kaj la rakonto daŭras ĝis la preparoj por la kongreso kaj somera universitato de Danzig en 1927. La kresko de nia afero dum la "Franca periodo," la neforgesebla unua kongreso en Bulonjo (Boulogne-sur-Mer) en 1905, la sekvanta vere internacia periodo kaj niaj progresoj ĝis la nuna tempo... ĉio estas vive prezentataj per la trafa kaj klara stilo, kiun la "Svisa skolo" konigis tra la tuta mondo. La rakonto tuŝas ĉiujn flankojn de nia movado: la kongresoj, la fondo de UEA (tiu verko de tre praktikaj revuloj), la Delegacio kaj la Ido-krizo (kiom malproksima tio jam saĝnas!), la Lingva Komitato, la organiza batalo, kiu tiom riĉigis nian lingvon per administraj vortoj kaj frazoj, la laboro dum la milito kaj la postmilita rekonstruado, la peresperantaj teknikaj kongresoj, kaj la disvastiĝo de nia afero en internaciaj sferoj (Ligo de naciaj, Internacia Laboroficejo, Telegrafa Unio, Unio de Radiofonio, k. a.) Ĉio ĉi iam estos temo de epopeo, ne nur de simpla senafekta historio.

De historio kaj literatura flanko la libro havas grandan valoron, sed ne sole de tiuj flankoj. Ĝi estas mino de praktikaj informoj por la propagandisto, kaj enhavas en si

multajn respondojn al la plej oftaj kontraŭdiroj. Ekzemple, la plej konata estas, ke la lingvo eble disfalis en dialektojn; sed la aŭtoro majastre rebatas tion, ne nur per apelacio al la praktika vivo de nia lingvo (regas nun en ĝia uzado pli da unueco ol iam antaŭe), sed ankaŭ per montrado de la centrigaj influoj de moderna vivo, telegrafo, aeroplano, radiofonio, gazetaro kaj aliaj, kiuj same emas unuecigi la plej disvastigitajn naciajn lingvojn kiaj la Angla kaj la Rusa. Pri la valoro de simpla, komuna lingvo en internaciaj kongresoj la aŭtoro donas frapantajn ekzemplojn: "En multlingvaj konferencoj regas ĉiam la grandlingvanoj, Angloj, francoj au Germanoj. La ceteraj ofte balbutas malfacile... timas ofendi aŭ ridigi tiujn, kies gepatran lingvon ili nevole difektas." Sed en konferenco uzanta Esperanton ili ne devas pensi, ĉu luno estas vira aŭ la suno virina, aŭ male, ĉu la verbo formiĝas regule aŭ malregule ktp; ne; ĉiu sentas sin egala kun la ceteraj, kaj ne timas erari. "Se ĉiuj aliaj popoloj interkomprenus sin tiel bone, kiel Angloj kaj Aŭstralianoj en kongresoj aŭ konferencoj, la mondo pli sanus."

De lingva vidpunkto la libro staras en unua rango; tion certigas la nomo Privat. La stilo estas pli regula kaj sobra ol la trafa kaj iom afekta stilo, kiun la aŭtoro uzis en sia "Vivo de Zamenhof." Kelkaj vortoj estas notinda. Ĉu ni bezonas "bankedo," "navante jam "festeno"? El neoficialaj vortoj, oni notas "elito, ekskludo, inkludo, stabileco," kies neceso estas diskutinda. La radiko "adult" estas uzata en senco "plenaĝulo, plenkreskulo"; ĉar laŭ la fundamento ĝi havas tute alian signifon (rompo de geedza fideleco), tiu uzo kreas konfuzon. Kaj... ĉu mi kuraĝos diri ĝin?... mi trovis kvar gramatikajn erarojn: "La membroj... sidas 9 jaroj" (paĝo 75); "kiu forgesigas malsaton kaj hejmosopiro" (p. 96); "En Brazilo, leĝo de 31-an de Oktobro 1918" (p. 107); kaj "de 1' 2-an de 8-an de Aŭgusto" (p. 175). Ho, doktoro Privat, doktoro Privat!

La libro estas bone bindita kaj impresita volumo, kaj valoro riĉigo de nia literaturo, efektive tia verko, tian ni kutimas ricevi de la entreprenema firma Hirt.

A.D.

## RECENZO.

## Citlibro Por Seriozuloj.

"Zamenhof-Radikaro", eldono de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

La titolo de tiu ĉi libro, eldonita de la firma Wuster, povas estigi erarkomprenon ĉe la ekleganto. Tion ĝi miakaze faris. La nomo de la verko pliguste povus esti la jena longaĵo: "Ĉiuj neoficialaj radikoj uzitaj de Zamenhof; kaj de la verkintoj en 'Fundamenta Krestomatio'; kaj de tiuj en 'La Esperantisto' (1889-95), kune kun iliaj ĉefaj trovlokoj." Sciencista studo—"Gradoj de Esperantigo," pritraktanta la demandon pri la transkribo de naciaj propraj nomoj en Esperanton, kaj lerte metoda "Klarigo pri la fontindikoj," ambaŭ modeloj de Germana ellaboriteco, klarige helpas konsistigi tiun ĉi 84-grandpaĝan vortarostudadlibron. Kiel Zamenhofaĵoj estas rigardataj tiuj radikoj, kiujn prese aŭ skribe uzis aŭ rekomendis d-ro L. L. Zamenhof, laŭ ekzistantaj dokumentoj, kaj "neoficialeco" karakterizas ĉiun radikon ne-estantan en la "Oficiala Radikaro" de Wuster (1923) kaj ties suplemento (1924). Ĉi-rilate estas interese iom studi la diferencon inter la enhavo de la "Oficiala Klasika Libro" de Grosjean-Maupin, la "Oficiala Radikaro" de Cart (1922), kaj la supreme nomita, kiun Wuster aŭtoritatigas.

La libro estas nur provizora, kaj enmondigas por jam nun iom kontentigi la urĝan deziron de la Esperantistaro pri plena Zamenhofa konkordanco, kiun oni intencas eldoni post finapero de la ĉionpostulanta, antaŭ ĉio gravega Enciklopedia Vortaro, kies kvara parto nun estas presata.

Kompletecon de la radikoj ili aspiros sed ne atingis, ĉar du gravaj verkoj de Zamenhof (restaĵo de la Malnova Testamento, kaj parto dua de la Fabeloj de Anderson) ne aperis sufiĉe baldaŭ por inkluzivigo. Ĉe speciale rimarkindaj maloftaj radikoj ili klopodis plimulte pri kompleteco, ol ĉe esprimoj tre ordinaraĵoj.

Kvankam ĝi estas eldonaĵo nure portempa kaj verŝajne anstataŭota per kompletigita plenradikaro, la verko estas tuja respondo al forta bezono, preta citfonto por la studento, kaj krome havas tion, kio mankas ĉe la Encik. Vortaro, nome, precizajn indikojn de la ĉefaj trovlokoj.

Tio multe ŝparas tempon, kaj ĉe granda nombro da studantoj povas forigindigi kiel nenecesaĵn la malnete prilaboritajn notarojn kaj "hejmefaritajn" citlibrojn.

Mi donu ekzemplon; — Malpacience mi gratas la kapon, ĉiam demandante min, kie trovi la Zamenhofan neoficialan "celebri," kiun mi nebule rememoras vidi ie dum mia disa legado? Sen la pritraktata libro mi povus vane dum horoj serĉadi, febre foliumante la "ordigitajn" kaj laŭmetodajn citojn de mi de tempo al tempo faritajn. Sed per helpo de la nuna volumo mi facile povas surfin-grigi la sinkaŝeman vorton, kiun ja la Majstro uzis unufoje . . . ĉe pĝ 10 de "La Rabeno de Balarah." Samfoje en la literaturo "ekspedicio," ĉe "La Rabistoj" 84, kaj leksikografie ĉe la vortaro Esperanta-Rusa. Ankoraŭ, ni rigardu vortolistojn de aliaj aŭtoritatuloj, kiaj Jan Janowski, unu laborinto por la "Fundamenta Krest." Tie ni sciigas, ke li uzis "organizatoro" (201 pĝ.) kun tiama aprobo de Zamenhof; ke iu anonimulo (85 pĝ.) elplumigis "uzurpatoro"; ke eble estis Mejerkszky, kiu donis al la mondo (vol. v, 95, 112 "La Esperantisto") la rimarkindajn historiajn "asociacio"; ke antaŭulo nenoma ĉe iv, 142 uzis "gentlemano," kaj ke N. Borovko (v, 105) enkondukis prove "cinismo" (cinikeco).

Por tiu libro mi faros kuŝlokon ie sur mia bretaro; ĝi enrigardate sin trovos ofte en miaj manoj ĝis kiam la kompletigita plena radikarkonkordanco de la Majstro siavice prenos ĝian niĉon.

La prezo estas 6 ormarkoj laŭ la Hirt katalogo.

ROBO.

## ANNUAL MEETING OF U.E.A.

This year's U.E.A. annual meeting will be held on 25th November at 8 p.m., in the rooms of the Melbourne Esperanto Society, 323 Bourke Street.

This meeting is specially important as Delegate and Vice-delegate for Melbourne for the next three years will be elected. Strenuous efforts are being made to insure a continuance of the various activities of the Association, and the chief delegate for Australia, hopes that all past and present members will renew their subscriptions and help in all other possible ways.

## KRONIKO.

BTRIBANO (Kvinslando). — Vespere festo (danco kaj amika kunveno) okazis la 12 oktobro en Suda Erisbano, aranĝita de la sindona fraŭlino Allie McCarthy kaj aliaj fervoruloj. En bele ornamita salono la samideanoj kaj iliaj amikoj dancis kaj sin amuzis ĝis malfrue. La festo plene sukcesis ankaŭ de financa vidpunkto, kaj riĉigis la kason de la societo per kelke da funtoj.

La 18 oktobro la societo akceptis kun granda plezuro sian anon sinjoro P. Proctor, kiu ĵus revenis el kelkmonata vojaĝo en Japanujo. Sinjoro Proctor rakontis siajn aventurojn de vojaĝado kaj precipe interesis la anojn per la profito, kiun li tiris el la uzado de Esperanto. La kono de la lingvo grave helpis lin ne nur en veturado, sed ankaŭ en la esplorado de liaj fakaferoj, celo de lia vojaĝo.

La societo decidis kunveni ĉiulusemajne anstataŭ monate; oni kredas per tio pli utili al la anoj, aparte al la pli junaj Esperantistoj, kiuj havos pli oftajn okazojn por ekzercado pri la parolado de la lingvo.

La regna turisma oficejo permesis alflikon de anonco en sia ejo montrantan adresojn de la delegito kaj vicdelegito de UEA kaj de la sekretariino; nepre utila al trapasantaj samideanoj.

MELBURN. V. — Dum lastaj semajnoj alvenis en Melburnon la atendita mondovojaĝanto, s-ro. Edmund Zschiele, kaj anoj el ambaŭ Esperanto Societoj laboris kune, por fari lian restadon en Melburno agrabla, kaj ankaŭ fari propagandon el la vizito. Sekve, laŭ aranĝo en la halo de la Aŭstralia preĝejo, s-ro Zschiele faris interesan paroladon pri siaj spertoj en la multaj landoj tra kiuj li vagis. Ne mankis prezentantaj kaj aliaj paroladetoj de kelkaj anoj, kaj ankaŭ malgranda teatraĵo tre rilacis.

Du vesperojn poste, en la ĉambroj de la Melburna Esperanto Societo, okazis tre sukcesa dancado. S-ro Zschiele ĉeestis kaj denove parolis pri siaj spertoj kaj la utileco de Esperanto dum sia vagado tra la mondo.

S-ro L. Hiob, el Estonio, brodkastis de 310, je okt. la. La parolado estis tre klara kaj interesa. La sin-

oro poste parolis ĉe la Esperanto Societo, pri siaj "Vojaĝimpresoj" kaj montris tre bonan stilon.

SYDNEY, N.S.W. — La 2an kaj 3an oktobro, kelkaj Sydney Esperantistoj vizitis la urbon Newcastle, kie ili estis bone gastigitaj de la tieaj samideanoj. London la 3an, ili vizitis la grandajn ŝtalfabrikojn ĉe Port Waratah. Oni aranĝis piknikon por la lu grupoj ĉe Gosford, kiu estas duone inter la du urboj, okazonta en komenco de decembro.

Laŭprograme s-ro E. A. Fryke informis paroladi, la 6an pri "La frateco de la homoj," sed li ne povis ĉeesti. Anstataŭ li, s-ro D. N. Edmonds, donis tre interesan paroladon pri la piramidoj en Egiptujo.

La 20an, s-ro A. Auwart donis interesan lumbild-paroladon pri sia vojaĝlando Estonia, kaj Finnlando.

Je alia vespero, oni havis "Kantadon de la samideanoj," kiam la samideanoj kantis kantadis Esperantajn melodiojn. Krom la ĉiunonata dancado, oni nun havas du aŭ tri piknikojn ĉiunonate. Dum tiu ĉi monato, la ekskursoj estas al Lane Cove Rivero, kaj Vaucluse parko.

Aperis artikolojn pri Esperanto en la jenaj gazetoj:—Newcastle Sun, 16-1X. Sydney Sun, 1-X. Labour Daily, 5-X. Telegraph, 7-X. S. M. Herald, 1-X. Wireless Weekly, 28-X.

AUCKLAND, Nova Zelando. — Dum la septembra kunveno de la ĉi-tia Societo, oni bonvenigis s-ron Sturge, vic-prezidanto de la Esperanto-Asocio ĉe Birmingham, Anglujo. En intereso-plena parolado la vizitanto rakontis al la ĉeestantaro siajn spertojn ĉe Esperanto-kongresoj okazintaj en diversaj Eŭropaj urboj. S-ro Sturge diris, interalie, ke li ricevis agrablan surprizon pri la miriga spirito de frateco kio ekzistas inter la Esperantistaro; ankaŭ ke, ĉar la naciaj kostumoj ne multe troviĝas en kongresoj, estas malfacile scii la nacieleon de la partoprenantoj. Tio-ĉi sendube konfirmas la universalecon de Esperanto.

La Danziga Kongreso estas forpasinta. Ĉi-tie, fakte tra la tuta lando, oni atendis kablagramojn raportantajn detalajn pri la kongreso, sed krom unu escepto, nenio estis publikata. La escepto estis kablo el Londono datita 21an septembro, kio konsistis el nur ĝenerala raporto de la Aŭstralazia delegito, s-ro J. G. Pyke, kiu donis siajn impresojn kongresajn, kune kun spertoj en la Balkanoj. La gazeto, "N. Z. Herald," traktis la novaĵojn bonforme, provizante tre alogan rubrikon je la supro.

Estas granda bedaŭro ke plena raporto pri la kongreso ne disdoniĝis telegrafe al la gazetaro, ĉar se jes, la movado tre fortiĝus kaj kredeble gajnus multajn geamikojn. Pro manko de tiaj raportoj la Nova-Zelanda publiko ne sciis dum kvin jaroj ke Esperantistaj kongresoj eĉ okazis. Estas tre konsilinde ke la diversaj kongres-komitatoj pli zorge atentu pri tiu —ĉi afero. Kvankam detaloj rilate al naciaj kongresoj kaj konferencoj de Esperanto ne estas atentataj, ŝajnas ke sciigo pri la tutmondaj kongresoj estus disvastigitaj senprokraste ĉu kable aŭ radie. Per tio sendube la lingvo en malproksimaj landoj en kiuj ni bataladas por enkonduki Esperanton ricevos stimilon.

MASTERTON, N.Z. — La Esperanto-klaso bone funkciadas. Estas kun granda plezuro kaj kontento ke la gvidantoj povas anonci pli multigon rilate al anoj. Tio-ĉi montras ke la lingvo disvastigas kaj popularigas. S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato, agas kiel sekretariino kaj s-ro Dewar, ĉe Y.M.C.A. estas la instruanto.

WELLINGTON, N.Z. — La novefondita klubo iom post iom firmiĝas. La membraro kreskas kaj la komitato preparis regulojn, kiujn la klubo akceptis ĉe ĝenerala kunveno dum 22a septembro, kiam ankaŭ oni aranĝis kunveni ĉiujade anstataŭ dufoje monate. Per tio, la lernantoj de la klubo ricevas daŭron instruadon.

## HAROLD PUDNEY

## Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posta. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

La fondiĝo de la klubo okazis ĝustatempe, kaj eĉ je tiu frua stadio de ĝia ekzistado faris multe por la lingvo. Al la fino de septembro, ĉefministro sinjoro Coates rekte atakis Esperanton kaj kiel rezulto vortbatalado daŭris per la kolonoj de la gazeto, "The Dominion." La prezidanto kaj sekretario partoprenis en la polemiko. Kvankam la ĉefministro parolis malfavore kontraŭ Esperanto (li montris kolosan nesciecon pri la temo) li efike propagandis la lingvon samtempe provizante okazon al la Esperantistoj antaŭenmeti publike diversajn detalojn kaj informojn.

La radia Esperanto-kurso antaŭeniras bonege. Ĉiusemajne de post komencigo leciono estis brodkastata, neniam menciinda interrompo okazinta. Je skribtempo, dek lecionoj estis klarigitaj. Laŭ nunaj arandoj la kurso finiĝos dum 15a decembro post kiam plena raporto rilate al la afero estos prezentata al legantoj de La Suda Krucio.

### NEKROLOGO.

Kun profunda malĝojo Esperantistoj en Aŭstralio kaj Nova Zelando sciigis kaj sciigos pri la morto, ĉe Aucklando, N.Z., dum 25a septembro, 1927a, de Johano Lowe King.

Al multaj samideanoj tra Aŭstralazio ne necesas klarigi kiu estis la mortinto ĉar li estas bone konata persone al tiuj, partopreninte en la Kvara Aŭstralazia Kongreso okazinta ĉe Sydney dum 1923a. Ĉiame bonhumora kaj agadema propagandisto, s-ro King akceptis multe da la malfacila kaj pionira laboro, kion li ellaboris finfine kun bonegaj rezultoj. Speciale menciinde estas lia laborado ĉe Gisborne, kie li starigis kaj instruis Esperanto-klason, brodkastis per la tiea radio-stacio, kaj estis la U.E.A. delegito.

Per la morto de s-ro King, la N. Z. Esperantistaro suferas la netakseblan pardon de la tria el siaj pioniroj. Al la vidvino, kiu ĉiufoje helpis sian edzen, etendiĝas esprimo de sincera kaj kortuŝa kondolenco de la multaj geamikoj.

Kun sincera bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de f-ino V. Irwin, kelkara ano de la Melburna Esperanto-Societo. Al ŝia familo ni sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

### THE ZAMENHOF SPIRIT.

Many students and believers in Esperanto often bewail the apparently slow progress of the language. Others express disappointment when the interest of Society and group members seems to slacken, when weaker members get behind with their subscriptions or irregularly attend the weekly meetings. Officials who undertake responsibility—financial and otherwise, editors and administrators of Esperanto magazines, each of whom gives his services freely, have cause occasionally for a feeling of despondency. This is only natural, in a measure it is warranted. Actually, there is no need for pessimism with regard to Esperanto. Nothing in the history of the world approaches what has been done by Dr. Zamenhof and those who have so faithfully supported him in the past and present.

It must be remembered that, unlike many other movements, Esperanto has not had the financial support of wealthy individuals or of national Governments.

All work in connection with Esperanto has been and is a labour of love, based on a belief that a universal knowledge of the language will make for peace and goodwill among people of all nations.

As with other idealistic movements some people are attracted—drawn by an idea that they may possibly gain immediate material profit; these soon realise that "there is nothing in it."

Others, burning with fiery zeal, rush into the movement imagining that the whole world can be brought into the Esperanto fold within the space of months; these soon weaken and fall away.

Fortunately the Esperanto movement contains thousands of patient men and women who are imbued with the unconquerable spirit of Dr. Zamenhof, people who realise that the spreading of Esperanto can only be accomplished by persistent, patient work.

The story of the early days of Zamenhof is an inspiration to all who are inclined to be despondent and pessimistic. Through poverty, ill-health, ridicule and even oppression he persisted, nothing could quench the spirit which was behind his ideals. Although he has passed away, he

yet lived to see some wonderful results of his faith and work. The spirit which animated Dr. Zamenhof still lives in countries, cities, villages and lands, far flung to the utmost limits of north, east, south and west.

Let us cultivate that spirit of persistent work, of undying love of peace and goodwill, of toleration and patience for the very human faults and failings of mankind.

Along that road and that way only can Esperanto become the universal auxiliary international language.

### RACE HATRED AND LANGUAGE.

Few people in America thoroughly realise what the curse of Babel means in terms of discomfort and even of danger. Language remains the worst frontier in Europe, the most complicated, the most impassible, the hardest to adjust, the most fertile in conflicts and hatred. . . . In western Europe, the geographical domain of even the major languages is, according to American ideas, pitifully small. The largest, the area of German speech, including the present republic, German Austria, parts of Czecho-Slovakia and Switzerland, and a fringe in Belgium, France, Italy and Poland, is smaller than the single state of Texas. What are 200 miles to the modern traveller? Two hundred miles is the distance, as the crow flies, from New York to Boston—a matter of less than six hours in a moderately fast train. Soon we shall think of it as a two-hour ride in a commercial airplane. Now, with any of the European capitals as the centre (with the exception of Rome) you will find that at least four languages are reached. E.g., London: English, Welsh, Flemish and Dutch, French; Madrid: Spanish, Portuguese, Catalan, Basque (misses French by a few miles); Berlin: German, Danish, Polish, Czech, etc. Such a circle forms very restricted bounds for the scientist or business man. And it is indeed, a prison. Beyond its wall reign incomprehension, diffidence, hatred.

—(Albert Guerard: Beyond Hatred).

### SOUNDS AND SENSE.

There is implied in Anatole France's contention a familiar theory, which is open to challenge; it is, that certain words have a suggestive music of their own. We believe that this is to a great extent a delusion; the music is in the thought much more than in the sounds. If a passage from a totally unknown language were read before you with level intonation, I should defy you to guess whether it was a love scene or an engineer's report. The French "coeur," for instance, has a sentimental softness, which, by the way, does not fit in with one of its secondary meanings, "courage." The German word "herz," in contrast, would seem to the French insufferably harsh. Yet it satisfies a people long noted for the music in their soul. The word "crepe" suggests invincibly the tragic black veils of the French widows until you remember that it also means "pancake." There is hardly any name of more potent appeal than Carmen. Those six letters exhale all the passionate fragrance of Old Spain. When I first saw in big headlines "Carmen strike" I was puzzled. Then I realised that this magic symbol could denote more prosaic beings than Merimee's Kitana.

Anatole France may have found Esperanto an ugly language. Is there such a thing as an ugly language? Is Volapuk itself more hideous than Magyar, which it superficially resembles, for people equally unfamiliar with both? If I threw before you such a word as "sghignazzandogli," would you tell offhand that it belongs to the most musical language heard on the lips of men? There is nothing so cacophonous in Esperanto that I could not match it in German, or in Greek, the tongue of the gods.

I feel some impatience when people dwell too heavily upon the beauty of French as a language. It is obvious that French possesses neither the sonority of the Mediterranean languages, nor the grand massiveness of German, nor the wealth and freedom of English. The instrument be hanged! I would rather hear a true musician perform on the Jew's harp than a third-rate fiddler scrape on a Stradivarius. I would rather read Renan in Malagasy, Tamil, or Volapuk, than Georges Ohnet in his nat-

ive French. . . . No language is really beautiful in itself. "Handsome is as handsome does": when a language conveys beautiful thoughts and evokes beautiful images, it cannot fail to acquire beauty. The rose by any other name, the sea in the most humble patois or the most debased jargon, love and death, youth and God, even in Volapuk, are entities that will charm the senses, thrill the heart, or fill the soul with awe.

—(Albert Guerard: Beyond Hatred).

## GAZETOJ RICEVITAJ.

Austria Esperantisto, 3; British Esperantist, 270; Bulteno Antverpena Komitato, 9; Der Arbeiter-Esperantist, 9; Esperanto-Mondo, 1; Germana Esperantisto, 8, 9; Heroldo de Esperanto, 34, 36, 37; Internacia Stenografisto, 24; Informservo de la Internacia Laboroficejo; International Language, Sept.; Internacia Medicina Revuo, 5; Libera Laboristo, 8; La Revuo Orienta, 9, 10; Pacifika Espero, 25-26; Vegetarano, 3; Verda Mondo, 9; Verda Stelo, 8.

**GVIDLIBRETO POR JAPANLAN-DO.** 37 ilustraĵoj, 9 mapoj. Trad. de la redakcio de Japana Esperanto-Instituto. Eldonita de Japana Ministrejo de Ŝtat-fervojoj, Tokio. 104pp. Senpaga laŭ seriozoj peto. La eldono de ĉi tiu libro estas afero de granda graveco por nia movado. La progresemo de la japana ministrejo estas imitinda ekzemplo por ni en a okcidento. La libro estas trezorejo de informoj ĉiuspecaj. Aparte ĝojgaj estas la belaj trikoloraj mapoj, kun Esperantaj preslitteroj de multaj specoj—modelo de arta presado.

**PRI LANDNOMOJ.** La sistemo de D-ro Zamenhof. Sekvata de Rimarkoj pri la Propraj Nomoj en Esperanto kaj ilia transskribo. Th. Cart, Prezidanto de la Lingva Komitato. 16pp.

## AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Por ŝpari la poŝtelspezoj ni kvitanas la ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—(la daton post la nomo kaj sumo, montras al kiu dato la abono estas pagata) M. T. Barnett, 4/6, marto '28; A. Saar, donaco 5/6, abono 4/6, junio '28; P. Abott, 4/6, junio '28; E. Chisholm, 9/6, aprilo '29; H. M. Cohen, 4/6, julio '28; L. Payne, 4/6, okt. '28; P. S. Wyatt, 12/6, julio '28; A. Bennet, 4/6 okt. '28.

**BRISBANE ESPERANTO CLUB** kunvenas la trian Mardon ĉiumonate, 7.45 p.t.m., ĉe State Service Union Room, trian etaĝon, King House, Queen Str. Vic-Prezidanto, C. Kidd. Sekretariino, Miss E. B. Carrick, Office of Supt. Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro N. Grant; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.t.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

**Hobaria Esperania Grupo.** Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino f-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso f-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

## Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.